

Joseph Freiherr von Eichendorff,
Melankolio

tradukita de Henryk Wenzel

Mi vagis boske, vale
en tarda frisko for,
ploremis akvofale
profunde en la kor'.

Kaj el pratempaj fruoj
vekiĝe val' salutis
kvazaŭ de foraj fluoj,
kiujn la nokt' englutis.

La suno dronis fore,
apenaŭ brizo ventis,
maldormis mi dumhore,
solece kamp' silentis.

*Traduko de la Germana poemo "Wehmut" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Henryk Wenzel.*

Arg-1006-2035 (2014-05-11 12:06:30)